

ĈEA-Retkomunikoj 2013/04



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉefa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

- [1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO](#)
- [2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO](#)
- [3. ALVOKO AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ](#)
- [4. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ](#)
- [5. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ](#)
- [6. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY](#)
- [7. LISTO DE ARANĜOJ](#)
- [8. BONDEZIROJ](#)

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la kvara kaj samtempe lasta numero de ĈEA-Retkomunikoj en la jaro 2013. Mi esperas, ke vi trankvile festis kristnaskajn festojn kun viaj geamikoj. Nun mi ŝatus inviti vin al la tralego de nova numero de ĈEA-Retkomunikoj. En ĝi vi trovos ĉefe invitojn al aranĝoj en la jaro 2014 sed ankaŭ invitojn al la legado de artikoloj ĉe retejo www.esperanto.cz.

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko de la naturo!



Redaktoro Miroslav Hruška

2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas [ĉi tie](#).

Arkivo de Retkomunikoj troveblas [ĉi tie](#).

3. ALVOKO AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ

Ni dankas al ĉiuj el niaj legantoj, kiuj dumjare aktivis por Esperanto (kaj multaj kadre de ĈEA). ĈEA kreas kaj disponigas siajn informretejojn kaj Retkomunikojn senpage por ĉiuj dezirantoj, do ankaŭ por ĈEA-nemembroj. Tiun ĉi strategion ni plu daŭrigos. Ĉiukaze kvankam ni faras la tutan laboron tute senpage, realigo de diversaj servoj, kiujn esperantistoj uzas, ion kostas. Tial SE POR VI GRAVAS NE NUR INDIVIDUAJ AVANTAĜOJ, SED ANKAŭ SOLIDARECO KAJ SUBTENADO DE LA IDEO DE



INTERKOMPRENIGO SUR NECESA INSTITUCIA BAZO, ni bonvenigos, se vi ev. prikonsideros vian (re)membriĝon aŭ financon donacon (en ajna alto, ankaŭ por konkreta difinita celo) por subteno de nia plua agado. ĈEA-membreco kun aliro al elektronika Starto kostas nurajn 240,- CZK jare por laborantoj kaj 140,- CZK por nelaborantoj (kun presita Starto je 110,- CZK pli multe). Jen troviĝas ĉeflingve [INFORMOJ PRI MEMBROAVANTAĜOJ](#), [ALIGILO](#), kaj [INFORMOJ PRI PAGMANIEROJ AL ĈEA](#).

Konsideru, ke LA ASOCIO ESTAS NE ESTRARO, SED ĈIUJ ĜIAJ MEMBROJ. Tial ni ankaŭ bonvenigos ĉies aktivan engaĝiĝon laŭ siaj eblecoj en diversaj agadoj (instruado, kontribuado al Starto kaj al [esperanto.cz](#), verkado de ĉeflingvaj artikoloj pri Esperanto, tradukado, ciferecigado de materialoj, kreado de instruaj kaj muzikaj sondosieroj kaj filmetoj, prilaboro de fotoj kaj videoj el aranĝoj ktp.ktp). Viajn ideojn kaj proponojn ni ĝojatendas ĉe la adreso cea@esperanto.cz.

4. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ

Invito en Pragon al 10.2.2014

La 10-an de februaro posttagmeze okazos en la plej granda salono de la Unio de interpretistoj kaj tradukistoj (JTP) en Prago du sinsekvaj eventoj organizitaj de la eldonejo KAVA-PECH kunlabore kun JTP. Ambaŭkaze la ĉefrolulo estos Humphrey Tonkin, profesoro kaj eksprezidanto de la Hartford-universitato kaj eksa prezidanto de UEA. La unua parto estos lia prelego en la angla pri la malfacilaĵoj, akompanantaj tradukiston de memuaroj, sur ekzemplo de sia traduko de „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ fare de Tivadar Soros el Esperanto anglen. En la dua parto, jam ĉeĥe, aŭ kun la ĉeĥa traduko oni baptos la cititan verkon en la ĉeĥa traduko de Jindřiška Drahotová, eldonon de KAVA-PECH. Invitilon kun pli da detaloj en la ĉeĥa vi trovos [ĉi tie](#)



Humphrey Tonkin

Kristnaskaj rabatoj por membroj de ĈEA

Ni ŝatus informi vin, ke ĝis la 24-a de januaro 2014 eblas mendi ĉe la eldonejo de Petro Chrdle KAVA-PECH librojn kun speciala kristnaska rabato - kondiĉo estas, ke vi estas membro de ĈEA, do se vi ankoraŭ ne pagis kotizon por la jaro 2014 aŭ eĉ ne membras en ĈEA kaj volus uzi tiun ĉi rabaton, nun estas plej bona momento tion fari.



Ĉeĥan liston de libroj vi povas trovi en tiu [ĉi artikolo](#) (en sekcio aldonajoj).

Migra ekspozicio pri esperanto en januaro okazos en Havířov

2.1. - 10.1. 2014 ĝi viziteblas en Galerio Maryčka, Hlavní třída 31a. Ĉiulabortagon inter la 14-a kaj 18-a horo, alitage laŭ interkonsento. 12.1. - 31.1. 2014 ĝi okazos en Kulturdomo Leoš Janáček, Dlouhá třída 1593/46. Malfermite ĉiun labortagon inter la 8-a kaj 20-a horo, dum semajnfino ekde la 14a ĝis la 18-a horo. Kontakto: zd.heiser@post.cz



Migra ekspozicio en biblioteko en urbo en Písek

5. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Artikoloj en esperanto en www.esperanto.cz

[Kristnaskaj kantoj kaj videoj](#)

[Muzikgrupo NOPROBLEM koncertis dum la 2-a IEL en Bartošovice](#)

[Interesaj filmoj: Mallonga 3D filmo pri la planedo Tero - esperantlingve dublita](#)

[Videoinvitoj al UK kaj IJK 2014](#)

[Novaĵoj el la projekto "Karel Čapek"](#)

[Muziko kaj kankano dum la Muzea nokto 2013](#)

Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:

[Tipy na využívání zajímavých esperantských stránek: 3. díl - web Lingvohelpilo](#) (Uzado de interesaj esperantaj retejoj - tria parto - retejo Lingvohelpilo)

[Videa z jubilejních oslav ve Svitavách](#) (Videoj de jubileaj festoj en Svitavy)

[Tipy na využívání zajímavých esperantských stránek: díl druhý - web Samopiniuloj](#) (Uzado de interesaj esperantaj retejoj - dua parto - retejo Samopiniuloj)

[Vánoční slevy pro členy ČES](#) (Kristnaskaj rabatoj por membroj de ĈEA)

[Tipy na využívání zajímavých esperantských stránek: díl první - web Edukado.net](#) (Uzado de interesaj esperantaj retejoj - unua parto - retejo Edukado.net)



[Esperanto dvakrát v brněnském rozhlasu](#) (Esperanto dufoje en radio de Brno)

[Literární okénko - Z historie překladové literatury 1](#) (De historio de tradukata literaturo)

[Tři smutná oznámení](#) (Tri tristaj anoncoj)

[Esperanto ve Svitavské televizi a ve Verda Stacio](#) (Esperanto en televido de Svitavy kaj en Verda Stacio)

[Esperanto v TV pořadu "Emoce a my"](#) (Esperanto en televida programo "Emocioj kaj ni")

[Před 100 lety se narodil profesor Štěpán Urban](#) (Antaŭ 100 jaroj naskiĝis profesoro Štěpán Urban)

[Počítačová poradna - používání klávesových zkratk pro psaní speciálních znaků](#)
(Komputila konsilejo - pli rapida skribado de specialaj signoj)

[Videoreportáž ze skautských oslav v Kopřivnici](#) (Videoreportaĵo de skoltaj festoj en Kopřivnice)

[Křesťanští esperantisté z celé Evropy se sešli ve Svitavách](#) (Kristanaj esperantistoj de tuta Eŭropo renkontiĝis en Svitavy)

6. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY

FOTOALBUMOJ:

[Jubilea solenaĵo en Svitavy 27.-29.9.2013](#)

[Tema ekspozicio "125 jaroj de Esperanto"](#)

SONDOSIEROJ:

[Tiu ĉarma vesper'](#) - kristnaska kanto - kantas Sepa kaj Asorti (Litovio)

[Jen venis al ni Tag' de Glor'](#) - antikva ĉeĥa novjara bondezira kanto - kantas kaj ludas P. Dvořáková

[La eta tamburisto](#) (kristnaska kanto The Little Drummer Boy) - kantas koruso Akordo (Nederlando)

[Alvenu fidelaj \(Adeste fideles\)](#) - kantas M. Smyčka

[Kanto "Verda kamparo" - muzikgrupo NOPROBLEM dum la 2-a IEL en Bartošovice \(Ĉeĥio\)](#)

[Karel Čapek - Interparoloj kun T.G.Masaryk - "Maljuna arbo"](#) - deklamas M. Smyčka

VIDEOJ:

[Animacia fabelo "Lu - Kristnaska historio"](#)



[PAŜOJ - Origina Esperanta kristnaska kanto de SoNori](#) (Japanio)

[Fabelo „Mikelo la sitelo“ \(el la projekto BookBox\)](#)

[Sciencfikcia dramo R.U.R. de Karel Čapek - plena versio](#)

[La Naskiĝo de Jesuo \(antaŭfilmo\)](#)

[Skota kanto „Tymian“ - grupo NOPROBLEM dum la 2-a IEL en Bartošovice \(Ĉeĥio\)](#)

[D-ro L. L. Zamenhof sur bildkartoj - kolekto el la tuta mondo de Georgi Litov el Bulgario](#)

[Momentoj el la 86a SAT-Kongreso](#)

Noto: Muzea paĝo ĉe Ipernity estas: <http://www.ipernity.com/home/181031>

NOVAJ FOTOGALERIOJ EN MUZEUM.ESPERANTO.CZ

[ĈEA-Konferenco en Nymburk](#)

[Regiono de Svitavy sur historiaj bildkartoj](#)

[Svitava ensemblo DOMA en Islando](#)

7. LISTO DE ARANĜOJ

2014-01-02/31: Migra ekspozicio "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" en Havířov. Kontakto: zd.heiser@post.cz

2014-01-04/06: 32-a renkontiĝo en Poludnica Informoj [ĉi tie](#).

2014-02-10: Bapto de „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ en Prago kun ĉeesto de Humphrey Tonkin. Pli da informoj en la ĉeĥa [ĉi tie](#) aŭ rete ĉe chrdle@kava-pech.cz

2014-04-30/-05-04: Bibliaj Tagoj en Tuchoměřice u Prahy, Info: stefanlepping@gmx.de

2014-05-12/18: Printempa Lingva Seminario en Skokovy Info: drahotova@esperanto.cz

2014-05-15/18: La 9-a Sabla Printempo en Skokovy Info: pisek@esperanto.cz

2014-06/15: Grimpado al Granda Ĉantorio Info: leontodo@centrum.cz

2014-09-12/14: Renkontiĝo de ĉeĥa IKUE sekcio en Svatý Kopeček ĉe Olomouc, Info: m.svacek@seznam.cz

2014-09/13 aŭ 20: Postferia Renkontiĝo en Strž apud Dobříš (laŭ dato de Festo de falanta foliaro en Muzeo de Čapek) Info: pisek@esperanto.cz

2014-09-27: Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado" en E-Muzeo Svitavy, Info: svitavy@esperanto.cz



2014-10-9/12: La 3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice Info: verdastacio@gmail.com

2014-10-24/26: ĈEA-Kongreso en Prostějov Info: cea@esperanto.cz

2014-11-29: Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek Info: pisek@esperanto.cz

2014-12-13: Marcipana Kristnasko en Svitavy Info: svitavy@esperanto.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

8. BONDEZIROJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-Retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-Retkomunikoj sukcesan jaron 2014.

Miro Piro (Miroslav Hruška), redaktoro de ĈEA-Retkomunikoj

ĈEA-Retkomunikoj 2013/04

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška –
retkomunikoj@esperanto.cz

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš

